

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



E N H A V O

	Pago
* * * Stelo super Afriko	1
V. Oljanov — Al organiza stabiliĝo de la societoj . . .	2
H. Levi — Krea programo	3

BELETRO KAJ POEZIO

Ĥr. Botev — Simbolo de la Bulgara Komuno	4
N. Mitev — Neatendita letero	4
P. Jordanov — Ne plu cedi	5
C. Murgin — Vintra medito	5
G. Dikovski — Graĵnoj en vento	5
D-ro A. Pomakov — Internacia konferenco pri vitaminoj	6
G. Georgiev — Saluton kaj dankcu	7
* * * Soveta helpo al nia lando	8

HEROA PASINTECO

lv. Sarafov — P. Jordanov	10
Tr. Петкова — За колективното кореспондирате . . .	11

NI RECENZAS

V. Ĉoĉov — Pluk-miniatiuroj de P. Thorsen	13
---	----

TRA LA GAZETARO, ORGANIZA VIVO, DEZIRAS KORESPONDI

Abonkolizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 dolaroj aŭ egalvaloro.

Reklamtarifo: 5 levoj por cm²; korespondanoncoj: 0.5 levoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 1000 .v.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5

SOVETUNIO: J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K-9.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

Frontpaĝa foto: En Pazarĉik post la jarkunveno



STELO SUPER AFRIKO

Minaca kolero ĉirkaŭprenas la tutan terglobon. De Pacifiko ĝis Adria maro, de Suda Oceano ĝis la tundro de Siberio, apud la riveroj Nil, Gang kaj Amazono tempestas incendioj de doloro kaj kolero. . .

Nia tempo ne apartenas al la epoko de la timemuloj, nek al la epoko de la sklavoj, kiuj toleros la tiranecon de la reĝoj kaj la ekspluatadon de la koloniaj landoj fare de la monopolistoj.

Via triumfo estas efemera, murdistoj de Patris Lumumba kaj liaj fidelaj kamaradoj! Antaŭ la blanka sunleviĝo de la libero, super la alarma vizaĝo de nia planedo la popoloj funebras pri vi, Lumumba!

Jes, Lumumba, la tuta progresema homaro nun profunde funebras pri vi.

Sed kion signifas via morto, batalanto, poeto Lumumba, se ne sunleviĝo de nova vivo, simila al la viro de Byron kaj Puŝkin, Petoefi kaj Botev, simila al la vivo de Karl Liebknecht kaj Rosa Luxemburg, Julius Fuĉik kaj Nikola Vapcarov — ankoraŭ unu stelo sur la firmamento de la mondo, brila kaj senmorta stelo super la horizonto de Afriko, por ke ĝi montru la vojon kaj inspiru la nigrajn gevirojn de la vekiga kontinento laŭ la vojo de la libero. . .

Afriko — nigra, varma kaj hela, Afriko en kiu situas Egipto, patrujo de sfinkso kaj de la piramidoj. Afriko en kiu situas Alĝerio, kies brusto estas vundita.

Kaj Kongo, ĥo en Kongo jam brulas la fajro al la libero kaj ĝi ardigas la korojn de ĉiulandaj liberadorantoj!

Ni estas pretaj fordoni ĉion, kion ni havas, por ke ni povu direkti sagon, trempitan en la venenon de nia doloro kaj malamo, al tiu fiulo, kiu katenas vin kaj murdis Lumumban kaj liajn kamaradojn.

La subpremanto de Kongo kaj Alĝerio jam estas malamata de ĉiuj liberamaj popoloj. Eĉ kiam li estas vestita en frako, tiu blanka pigmeo de la civilizo opinias, ke la leĝo de la ĝangalo estas pli forta ol la homara impeto al nova progreso.

Trompo! Trompo ĝi estas. sinjoroj imperiistoj!

Kaj eĉ se la araboj kaj negroj — buŝmenoj kaj ĥotentotoj diros al vi iun tagon: Ho, nizeraj murdistoj, vi falis sub niaj piedoj, sed ni forbalaos vin for de nia vojo, eĉ laŭ eble sen makuli niajn manojn per via sango. . .

Sed la sango de Patris Lumumba brilos kiel stelo tra la jarcentoj kaj montros al la afrikaj popoloj la vojon al la libero kaj justeco!

Ni, la bulgaraj esperantistoj kune kuu nia tuta popolo funebras pro la granda perdo de unu el la elstaraj gvidantoj de nova, katenojn rompanta Afriko. Samtempe ni deklaras ke ni fordonos ĉiujn niajn fortojn por neniigo de la abomena koloniisma sistemo!

AL ORGANIZA STABILIGO DE LA SOCIETOJ

Dum januaro kaj februaro okazis la jarkunvenoj de la plimulto de niaj Esperanto-societoj. Ĉi jare ili pasis pli organizite, estis pli amase vizititaj, la raportoj pli komplete respegulis la societatan agadon kaj desegnis la taskojn de la nova jaro. Pri tiuj ĉi sukcesoj helpis la ĝustatempa dissendo de instrukcia cirkulero de CK de BEA kaj antaŭ ĉio la intensigita aktiveco de la societoj mem. La zorgema antaŭpreparo kaj planado de la jarkunvenoj dum tiu ĉi jaro permesis al CK certigi la ĉeeston de siaj reprezentantoj en la plimulto de la jarkunvenoj. Ĉio ĉi rezultigis sukcesajn kunvenojn. La raporto ekzemple de s-to „Internacia Amikeco“ en Dimitrovgrad faris tre bonan analizon de la organiza stato de la s-to. Ĝi apartigis konsiderindan lokon al la tiel grava problemo — la internacia korespondado. Iuj s-toj kiel „M. Gorkij“ en Sofio, „Vekigo“ en Kolarovgrad k. a. emfazis la gravecon de la kulturkleriga kaj la eduka laboro. Ĉie oni plibonigis la konsiston de la estraroj per pli aktivaj gesamideanoj. Multaj junuloj estigis estraranoj. La societoj voĉdonis trafikajn decidojn por plibonigo de la agado kaj atingo de pli grandaj rezultoj.

Kompreneble en la organizo kaj la efektivigo de la jarkunvenoj estis ankaŭ multaj mankoj: nesufiĉa vizito (M. Gorkij — Sofio, „M. Gorkij“ — Jambol), iuj raportoj ne respegulis bone la agadon (la fervojista en Sofio), iuj decidoj ne estis sufiĉe profunde pripensitaj. Sed malgraŭ tiuj mankoj la kunvenoj pasis je pli alta nivelo ol kiam ajn antaŭe. Kaj tio ja estas solida bazo por pluaj sukcesoj por stabiligo.

Kio estas necesa?

La regula kunvenado estas la unua efika rimedo por disciplinigo, por grupigo de la anaro ĉirkaŭ la estraro. Oni devas bone pripensi la enhavon de tiuj kunvenoj. Ilia celo estas la praktikado de la lingvo, sed samtempe ni povas ilin saturigi per enhavo eduka kaj kleriga. La estraroj devas labori laŭplane. La praktiko montris ke la plej óportunaj planoj estas la kvarmonataj. Ili devas desegni la ĉiaflankan agadon de la societo.

Por la bona gvidado de la societoj tre gravaj estas la regulaj kunsidoj de ties estraroj. Sufiĉas dufoje en la monato. En ili oni devas pridiskuti ankaŭ la ricevitaĵajn dokumentojn de CK. Estas ne maloftaj okazoj, kiam la sekretario ricevas cirkulerojn, instrukciojn kaj leterojn de la Asocio kaj neniu alia scias pri tio. Ni devas tuj ĉesigiti praktikon.

La regulaj interrilatoj inter la asocio kaj la societoj estas grava elemento por la stabiligo de la organiza stato de la lastaj. La estraroj devas pli atente legi la instrukciojn de la Asocio kaj pli ĝuste ilin plenumi. Nur antaŭ du montaj CK sendis instrukcion pri la pago de la membrokotizo kaj iuj societoj montras jam malatenton al ĝi. Tia sinteno kompreneble malhelpas la bonan organizan vivon de la asocio.

Ĉiaspecaj amasaj aranĝoj kiel amuzvesperoj, ekskursoj, intersocietaj renkontigoj k. a. variigas la societatan vivon, vekas pli grandan intereson ĉe la anaro kaj finfine cementigas la ligan inter la membroj kaj la estraro. La regula distribuo de la laboro inter pli granda nombro de membroj kreas pli da aktivuloj. Nur tiumaniere ni povos havi verajn organizaĵojn kun interna disciplino kiuj povos ludi la rolon de socia faktoro.

Violin OLJANOV

KREA PPOGRAMO

Riĉa kaj fruktodona estis por nia popolo la pasinta 1960. Ĉi estis jaro en kiu estis plenumita la tria kvinjara plano nur en daŭro de tri jaroj.

Rememoru pri la multaj kaj plej diversflankaj sukcesoj, atingitaj de nia popolo! Dekoj da novaj fabrikoj kaj uzinoj plialtigis nian ekonomian fronton. Plimultigis la materiala produktado ĝis tiu nivelo, kiun ni devis atingi en 1962. La salajroj de 1.350.000 laboristoj kaj oficistoj estis plialtigitaj. Grandegaj estas la sukcesoj en ĉiuj branĉoj de nia ekonomia, kultura kaj socia vivo. Ili plenigas kun ĝojo la koron de ĉiu esperantisto en nia lando.

Tiuj sukcesoj donis al ni, laboristoj kaj oficistoj, terkulturistoj kaj intelektuloj impulson por labori pli bone kaj pli efike. Labori por la popolo, por ĝia materiala kaj kultura progreso — en tio la bulgara esperantistaro vidas sian plej gravan taskon.

Ĉi-jare komencigis la nova kvara kvinjara plano. Niaj espero kaj niaj planoj por vivi kaj labori pli bone en paco, ni vidas enskribitaj en la du gravaj dokumentoj, akceptitaj de nia parlamento — la buĝeto kaj la plano por la disvolvigo de nia ekonomio en 1961. Ili ambaŭ enhavas la esencon de la programo de la Bulgara Komunista Partio; en urgaj templimoj konstrui la materialan bazon de la socialisma socio en nia lando.

Ĉu iu ŝtato kaj ĝia politiko servas al la popolo aŭ al grupeto da monopolistoj oni povas vidi en la spegulo de ĝia buĝeto. La enspezoj, antaŭviditaj en nia nunjara buĝeto estas 33,2 miliardoj da levoj. El ili 25,6 miliardoj da levoj venos ne de la poŝo de popolo, kiel ordinare okazas en la kapitalismaj landoj, sed de enspezoj de niaj socialismaj entreprenoj.

La elspezoj de nia buĝeto ne plenigas la kasojn de kapitalistoj. Ili estas elspezataj por la bezonoj de la popolo —

por ĝia ekonomia kaj kultura bonstato. Ĉirkaŭ 22.2 miliardoj da levoj de la elspezoj estas planitaj por investoj al plua disvolvigo de nia socialisma ekonomio. Pli ol 7 miliardoj da levoj estas asignitaj por sociaj kaj kulturaj aranĝoj — klerigo, kulturo, scienco, sanzorgo, sociala sekureco ktp. En la sama tempo por defendo de la lando, la sumo estas nur 2 miliardoj — 6% el la tuta sumo de la elspezoj, kvankam por armiiĝo kaj daŭrigo de la „malvarma“ milito Usono kaj aliaj imperiismaj landoj elspezas la duonon de siaj buĝetoj.

Laŭ la nunjara plano pli ol 7,8 miliardoj da levoj estas asignitaj por konstruo de novaj fabrikoj, uzinoj, elektrocentraloj, maŝinoj pri la agraraj maŝtrumoj ktp.

Nia lando nur en mallonga tempo de 16 jaroj — ŝanĝis sian fizionomion dank'al la helpo de la frata Sovet-Unio (en la kuranta jaro ni ricevos kredition de 810 milionoj da levoj) kaj aliaj socialismaj landoj.

De nia malriĉa, agrara, uuevoluinta lando, konata al multaj el niaj amikoj eksterlande antaŭ la dua mondmilito, nun restis nur la rememoro pri ĝi. Dum la popola regado nia lando transformiĝis en progresinta industria lando. Grandoj estas ankaŭ la sukcesoj en agrikulturo kaj brutbredado, kie venkis entute la kooperativoj.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, fieras pro tiuj sukcesoj. Ni vidas ke nur la socialismo servas vere al la popolo kaj al la homaro. . .

La bulgara esperantistaro, trovas la esencon de sia vivo kaj laboro en servo al sia patrolando kaj pere de ĝi al la tula homaro. Tial la esperantistoj donis kaj ĉiam donos siajn fortojn kaj sperton por la plenumo de nia programo, formulita en la plano pri evoluo de nia lando en 1961.

Haim LEVI

SIMBOLO-KREDO DE LA BULGARA KOMUNO *

Hristo Botev

Mi kredas je la unueca komuna forto de la homa gento sur la terglobo, kiu forto kreas bonon.

Kaj je la unueca komunista sociordo, savanto de ĉiuj popoloj el la jarcentaj suferoj kaj ĉagrenoj per frata laboro kaj egaleco.

Kaj je la hela vivokrea spirito de la racio, plifortiganta la korojn kaj la animon de ĉiuj homoj por la prospero kaj la triumfo de la

komunismo pere de la revolucio.

Kaj je la unueca kaj nedisigebla patrolando de ĉiuj homoj kaj komuna propreco de ĉiuj bienoj.

Mi kredas je la unueca hela komunismo, foriganto de la sociaj kriplajoj.

Mi atendas la vekigon de la popoloj kaj la estontan komunisman sociordon en la tuta mondo.

NEATENDITA LETERO

La vetero estis bela kaj agrabla. La sunbrilo milde karesis per varmaj kisoj la krevigintan teron. Falas flavigitaj folioj de la tran kvile starantaj arboj. De tempo al tempo ekblovas venteto. Jam estas forflugintaj al la malproksima sudo ĉiuj migrantaj birdoj. Estas ora aŭtuno. La maizagroj kaj la fruktĝardenoj abundas je fruktoj, sed labormanoj mankas. La devo antaŭ la patrujo en tiu momento alvokis ĉiujn junajn kaj kapablajn militbatalantojn al la batalkampoj por likvido de la hitlerofaŝismaj armeoj sur la Balkano. Tie estas ankaŭ la nura filo de avo Trifon — Stojan.

Sur la nigra kaj polvoplena intervilaga vojo, kun malrapidaj paŝoj kaj kun enpoŝigitaj manoj piedmarŝis malalta homo. Estis avo Trifon. Li marŝis kun sako sur la ŝultro kaj lia argila pipo jam ne fumis. De tempo al tempo li translokigas ĝin de unu al alia flanko en sia sendenta buŝo. Li marŝis nudpiede sur la malvarma polvo profunde enpenŝiginta. De sia filo Stojan, kiu estas militbatalanto, de multa tempo, leteron li ne ricevis. Avino Anastasia, lia edzino, de ses monatoj estas malsana. Lia malgranda agro estis fruktoplena. Piroj, pomoj, maizoj, kukurboj kaj aliaj aŭtunaj fruktoj putrante kovris la teron. La maljuna koro de avo Trifon premiĝis pro doloro kaj peno. Kiel multe tio pezis sur la animo de avo Trifon.

De la malproksimaj arbustoj io ekbruis. Avo Trifon eliris la pipon el la buŝo. Li haltis rigardante dekstren kaj maldekstren kun tremanta kapo kaj ĉirkaŭrigardis. El la arbustoj eksaltis sur la vojon granda griza leporo. La koro de la maljunulo ekbatis forte kaj maltrankvile. Malbonaj pensoj invadis en lian su-

ferantan animon. Laŭ la popola kredo, tio estas malbona signo. . .

Alproksimiĝante al la vilaĝo avo Trifon rimarkis sian nepon Deĉjo, kiu kuris nudpiede sur la polvoplena vojo. Rimarkinte sian avon Deĉjo ekris: — avooo, ni ricevis leteron de mia paĉjo, leteron, leteron. . .

— Letero, finfine letero — ekridis la avo kaj komencis marŝadi pli rapide. Li sciis, ke en tiu momento lia filo batalas kontraŭ la hitlerofaŝistaj bandoj sur pinto Stracin en Makedonio. Kaj laŭ la sciigoj tie la batalo estas malegala kaj sangverŝa.

Sed avino Anastasia ree aperis antaŭ lia rigardo, tia kia li lasis ŝin malsana sur la lito. La leteron traegis ilia bofilino. Ŝi kaj avino Anastasia laŭte lamentis. . . Stojan estis pereinta en la militbatalo. Avino Anastasia senkonscie turnis sian palan senvivan vizaĝon al la muro, tenante la disfalditan leteron kaj svenis sur la plankon. . . Avo Trifon kun enmanigita ĉapelo, staris antaŭ sia mortinta edzino, kaptis la leteron, sed ĝi estis forte tenata de ŝia senviva mano. Ŝi estis mortinta.

Forpasis longaj zorgoplenaj tagoj kaj noktoj. Sed post la venkoplena kaj glora batalo kontraŭ la faŝistaj konkerintoj la granda ĉagreno de avo Trifon kaj lia bofilino estis disemita de la nova vivo en la novefondita agrikultura kooperativo. En ĝi ili eksentis la helpon kaj la zorgon de la kolektivo kaj la fruktojn de la komuna laboro. En ĝi avo Trifon kvazaŭ plijuniĝis kaj eksentis ke la pereco de lia filo ne estis vana. . . Li fordonis sian vivon por la patrio kaj justa socio.

N. Mitev
Dimitrovo

* Okaze de la 90-jara datreveno de la Pariza Komuno.

NE PLU CEDI!

Petro Jordanov

Mi jetis mian liron melodian
kaj diris: mi ĉesigas mian kanton!
Riproĉis mi la mondan apation,
en fajron jetis mian revon sanktan.

Kaj longe ploris mi je mia sorto,
konsolon trovis nur en larma plendo.
Mi revis mian finon, kaj pri l' morto
mi jam meditis en amara sento. . .

Ĉu falos mi rezigne kaj sen lukto?
Ĉu mia kredo, agoj, idealo,
ĉu vivo mia — restos do sen frukto?
Ne! — tamen — ili estos ja realo!

Mi kredas je l' estont' per kredo forta
je ĉi estont' ne povas mi ne kredi!
Premite de la zorgo kaj de l' sorto,
decidas tamen mi: ne cedi, ne plu cedi!

VINTRA MEDITO

Canko Murgin

Aranĝis ekstere
la vintro kolera
konkuron
teruran.

La ventoj furiaj
sen ceremonioj
ekagas
per sagoj.

Kaj vipoj strangtipaj
ekplafas al ripoj
kaj frapas
al kapoj

La Neĝa Tempesto —
gvidanto de l' festo
sigelas
la helon.

Tra kampoj kaj montoj,
riveroj kaj fontoj
radias
glacion.

Kun fera obstino
rektiĝas nur pinoj
kaj pelas
malhelon. . .

Se ankaŭ pacfortoj
kontraŭas al Mort' ni
evitos
militon.

GRAJNOJ EN VENTO

Georgi Dikovski

Grajnoj en vento
per elokvento
de lingvo bela
kreskas, en helo. . .

Grajnoj en vento —
multe da gentoj,
falas en grundon
riĉe fekundan.

Grajnoj en vento
ĉiun momenton
al homfeliĉo
sin ja dediĉas!

Grajnoj en vento
homan konsenton
— bela ornamo,
ĉien proklamas. . .

Grajnoj en vento
— ĉi nova sento,
la junularon
vokas: „Ne staru!

Ne plu suferu
pro milit' Tero!
sufiĉas spaco
vivi en paco!“

Grajnoj en vento,
vera evento —
kreas konstantajn
homajn rilatojn.

Grajnoj en vento —
koro kaj sento
per lingvo bela
kresku en helo.

INTERNACIA KONFERENCO PRI VITAMINOJ

De la 2-a ĝis la 4-a de novembro 1960 en Sofio okazis Internacia Konferenco pri la vitaminoj. Ĉeestis delegitoj el Sovet-Unio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Germanaj Demokrata kaj Federacia Respublikoj, Anglio, Francio, Norvegio, Rumanio kaj Bulgario. La konferenco estis organizita de Bulgara Akademio de la Sciencoj.

En la konferenco estis raportitaj esplorkonferencoj pri la vitaminoj en la agrikulturo, en la veterinara kaj humana medicinoj, en biologio ktp. La raportoj enhavis interesajn novaĵojn el vitaminologio, tiu rapide disvolviganta branĉo de la biologio. La raporto de prof. Kolev el Agrikultura Instituto de la Bulgara Akademio de la Sciencoj estis tre interesa. Li atentigis pri la bulgaraj legomoj, riĉaj je vitamino C kaj karoteno, ekzemple kapsiko el regionoj de Plovdiv kaj Pazarĝik, kiu entenas 240 mgr da vitamino C en ĉiuj 100 gr da frukto kaj karotenon 23,3 mgr. Ĉiutaga bezono de vitamino C por la homo estas 80—100 mgr. Prof. I. Emanuilov kun kunlaborantoj esploris, ke iuspecaj algoj de Nigra Maro, entenas ĉirkaŭ 216,65 gamojn da vitamino B₁₂ en ĉiuj 100 gramoj da seka substanco. P. Gahnjan el Veterinara Instituto en Sofio raportis pri la enhavo de vitamino P (citrin) en iuj floroj. S. Bremner (kun kunlaborantoj el Sovetunio) komunikis al la konferenco sian metodon kuraci per vitaminoj B₆ kaj B₁₂ stomakan kaj duodenan ulcerojn. Pli bonan sukceson ili havis en la kuracado de tiu malsano per vitamino B₁₂. O. Brekan el la Fiŝesplora Instituto en Norvegio raportis pri sia malkovro de vitamino E en ĝia aspekto de L-tokoferolo. M. Kramer kaj P. Tarjan el la Instituto pri la Nutrado en Hungario sciigis, ke plej grandan biologian laboron havas tiuj kreskaĵoj, kiuj entenas multajn inaktivigitajn karotidoidojn

La albumino en la nutraĵo plej bone helpas la utiligon de la karoteno. La kupro kaj la zinko malhelpas la utiligon de la karoteno. N. Nikolov de la Medicina Instituto en Plovdiv, komunikis siajn interesajn eksperimentojn pri la influo de vitamino PP al la supera nerva funkcio. Li konstatis, ke mezaj dozoj de vitamino PP, 25—50 mgr. po tage ekscitas la funkcion de la supera nerva sistemo kaj plibonigas la staton de la neŭrastentiaj malsanuloj, la grandaj dozoj de la sama vitamino subpremas la superan nervan funkcion.

Akademiano M. Stojanov raportis al la konferenco pri la abunda kvanto de sovaĝaj fruktoj en nia lando. En niaj arbaroj kreskas diversaj fruktodonaj kreskaĵoj riĉaj je vitamino C, kiel ekzemple sovaĝa rozo (*solanum nigrum*).

Profesoro T. Tasev, direktoro de la Instituto pri Nutrado en Sofio, informis pri la kontribuo de la bulgaraj sciencistoj al la esplorado de vitamino PP. Jam en 1899—1902 doktoroj V. Georgiev kaj T. Petrov per eksperimentoj je hundoj pruvis, ke la pelagro estas malsano rezulte de la manko de ia substanco en la nutraĵo.

Laŭ Ŝiphan de la Germana Federacia Respubliko, tiuj karotoj, kiuj estas plej grandaj kaj plej orangaj estas plej riĉaj en karoteno. Ĉi tio dependas de la grundo, kie ili kreskas kaj de la forteco, daŭrigo de la suna lumigado.

La aliaj raportoj estis ankaŭ tre interesaj, sed la loko ne permesas al ni skribi pri ili.

Ĉiuj raportoj de la konferenco estos eldonataj en aparta volumo. Oni decidis la venonta konferenco pri la vitaminoj okazu en Ĉeĥoslovakio — Prago.

D-ro Anton M. POMAKOV
supera scienca kunlaboranto
dietologo ĉe la Instituto
de Fizioterapio kaj Kurortologio — Sofio

**AL BULGARAJ SCIENCISTOJ
— SALUTON KAJ DANKON!**

Ĉiutage alvenas ĉe ni centoj da eksterlandaj turistoj, altiritaj de naturaj belecoj de bulgara tero, agantaj homoj — interesigantaj pri la rapida progreso de nia socialisma mastrumo, homoj de la arto, al kiuj la bulgaraj scenejoj, ekspoziciaj kaj koncertaj salonoj gastame malfermis pordojn.

Sed dum la lastaj du jaroj ĉe ni alvenis ankaŭ kelkdekoj da iom plialiaj vizitantoj. Ili alvenis kune kun palaj paralizitaj infanoj — viktimoj de poliomjelito kaj kun fajrero da espero en plorintaj okuloj. Tiu ĉi fajrero da espero estis bruligita de la novaĵo, ke sciencisto de socialisma Bulgario inventis medikamenton kontraŭ la difektoj de la danĝera malsano.

Tiuj ĉi gastoj de nia lando pasigis sian tempon ne en la modernaj kaj vizitataj somerrestadejoj laŭ la bordo de Nigra maro, sed en iu malsanulejo. La persistaj zorgoj de la bulgaraj kuracistoj kaj la ĝojigaj rezultoj serenigis la gepatrajn vizaĝojn. Post monato, du aŭ tri ekestis la horo de la disiĝo. La patrinoj malfacile retenis siajn larmojn kaj en la infanaj okuloj la danko kaj la feliĉo kunfandigis. La malgrandaj suferuloj revenis hejmen feliĉaj, ili revenis al la ludoj de siaj kamaradetoj, ili revenis al la vivo!

„Kiam mi alvenis en Bulgarion kun mia malfeliĉa, malsana knabineto — skribas Venezia Primo el Tel-Aviv — mi estis unu malesperigita patrino. Kaj jen post proksimume 2 monatoj mi forlasas vian landon kun nova kredo, ke por mia infano alvenos pli brila estonteco,

Ni esperu — daŭrigas la patrino — ke ne estos malproksime la tago, kiam la socialismo, kiu malfermis al vi larĝajn pordojn por progreso en la scienco, lumigos ankaŭ mian malgrandan

kaj malriĉan landon, kaj ke venostago, kiam man-en-mano la sciencistoj el la tuta mondo semos sanon, ĝojo kaj espero inter ĉiuj infanoj tra la tuta mondo kaj inter iliaj patrinoj!“ — jen estas la bondeziro de Venezia Primo la esperigita patrino de la kuracita ĉe ni knabineto.

Sed dum en la bulgaraj malsanulejoj kuracistoj kaj gepatroj ĝojas al la ricevataj rezultoj de la kuracado per la bulgara specialaĵo „nivalino“ ili ĝojas al la reakiritaj movoj, al la revivigintaj ridetoj sur la infanaj vizaĝetoj, de proksimaj kaj malproksimaj landoj al la bulgara Ministerio de la Popola Sano ĉiutage alvenas novaj leteroj kun petoj kaj dankoj.

Moris Lagut el la franca urbo Koto skribas: „Post la unua etapo de la kuracado kun „nivalino“ nia filo, malsana de poliomjelito ricevis konsiderindan plibonigon. La medikamento estas efika. Mi petas bonvolu sendi al ni pliajn ampolojn kaj akceptu mian dankon!“

Itala pentristo Mario Kelderizi el urbo Palermo anoncas: „Post kuracado per „nivalino“ mia infano eksentis grandan plibonigon de sia sanstato. Via maldekstra mano, kiu en daŭro de 18 monatoj ŝajnis malviva resanigis laŭ rimarkinda maniero. La infano plibonigis ankaŭ la movojn de la piedoj. Mi petas, bonvolu sendi al ni ankoraŭ unu dozon da „nivalino“ kaj mi kore dankas!“

El najbara Greklando alflugis telegramo: „Ni informas vin pri la unuaj sukcesoj ĉe la kuracado per „nivalino“. La malsana pro traŭmatismo de vertebraro, paralizita ĉe la lito, leviĝis kaj marŝas. La kuracado daŭras. Ni salutas vin! Tasos.“

Nia Lida komencis iri memstare — skribas en kortuŝa letero la soveta civitanino Zamjatina. Vi ne povas imagi — sin turnas la patrino de Lida al la in-

ventitno de „nivalino“ d-ro Dimităr Paskov — kiom vi bonfaris por nia familio!“

Hrang Sahajan el Damasko — Siria provinco de Unuigita Araba Respubliko sciigas al la Bulgara Ministerio de Popola Sano, ke lia filo, kuracita en iu damaska kliniko kun bulgara preparaĵo „nivalino“, ricevis konsiderindan plibonigon kaj diris ke „nivalino“ estas „nun el la plej senzaciaj kaj utilaj kuraciloj por la homaro.“

Kaj la gepatroj de la preskaŭ 4-jara Haim Menteš, el urbo Jafa — Izraelo aldonas al sia dankletero al d-ro Paskov du fotografiaĵojn. De unu el ili rigardas al ni la malgajaj okuletoj de

paralizita infano, ĉirkaŭpremita per ortopedia zono kaj aparataro por la kruro. De la alia — ridetanta knabeto, deŝirita por momento de la ludo kun siaj kamaradetoj.

Homo malfacile ekkonus la saman infanon en la du fotografiaĵoj. Kaj ili estas faritaj nur en intervalo de du monatoj, dum kiuj la infano estas kuracita per „nivalino“. La malgranda Haim ridetanta ludas kun siaj kamaradetoj kaj la gepatroj. Kai la gepatroj, kiel dekoj da aliaj gepatroj emociigite skribas: „Al la bulgaraj sciencistoj saluton kaj koran dankon!“

N. GEORGIEV.

SOVETA HELPO AL NIA LANDO

Granda estas la kontribuo, aŭ pli ĝuste — la helpo, kiun faris kaj daŭre faras la Sovet-Unio por transformo de Bulgario en landon kun altevoluinta industrio. Tiu ĉi helpo komenciĝis tuj post la starigo de la popola regado. Dum la forpasintaj 16 jaroj la bulgaraj laboruloj sentadis tute konkrete tiun ĉi helpon. Inter ili, en diversaj novaj konstruobjektoj, konstruataj kun soveta materia helpo, troviĝis konstante ankaŭ sovetaĵaj specialistoj — inĝenieroj aŭ ordinaraĵaj laboristoj. Ili staris ŝultron ĉe ŝultro kun siaj bulgaraj kamaradoj, instruis al ili kaj konstruadis kune kun ili.

Se ni turnus rigardon al ciferoj, ni konstatos, ke dum niaj tri ĝisnunaj kvinjaraj planoj Sovetio disponigis al nia lando kredition je sumo de proksimume 11 miliardoj da levoj, kiuj estis investitaj en konstruado de multaj kaj grandaj industriaĵaj entreprenoj.

Tiel ekzemple, en la unua kvinjara plano estis konstruita la Kemia Kombinumo „Stalin“ en urbo Dimitrovgrad; ĝi produktis la unuajn artefaritajn sterkojn ĉe ni. Nun, denove per ĉi helpo apud Stara Zagora estas konstruata

nova uzino por azotaj sterkoj. La Kemia Kombinumo „Stalin“ kaj la konstruita iom pli malfrue superfosfata uzino en urbo Dimitrovgrad nun plivastigas. Tiamaniere en la proksimaj jaroj la produktado de kemiaj sterkoj superos dekoble la nivelon de 1952.

Estas konate, ke la produktado de metalo estas unu el la plej gravaj indicoj pri la nivelo de la indusiriigo de iu lando. En 1953 ekfunkciis la unua metalurgia uzino en Bulgario. Kaj nun kun la helpo, kiun donas al ni Sovetio ni finkonstruos en la proksimaj jaroj metalurgian kombinumom ĉe la malkovrita antaŭnelonge fererca trovejo apud v. Kremikovci, distrikto de Sofia. Tiu ĉi uzino produktos ĉiujare milionon da tunoj da ŝtalo kaj kontentigos grandparte niajn bezonojn de metalo.

Sed por transformi unu subevoluintan landon en industrian landon antaŭ ĉio estas necese krei energiajn fontojn. Ni jam havas bazon por tio. Laŭ la pokapa produktado de elektroenergio al la loĝantaro, ni jam superas vicon da progresintaj industriaĵaj landoj. Dum, en la jaro 1939 ĉe ni oni produktis por ĉiu loĝanto apenaŭ po 42 kilovathoroj

en la fino de la pasinta jaro ĝi kreskis al 600 kilovathoroj. Kaj en la fino de 1955 Bulgario produktis por ĉiu loĝanto duoble pli da elektroenergio ol Greklando kaj preskaŭ kvinoble pli ol Turkio. Ni aldonu ankaŭ tie ĉi, ke la pli granda parto de la novaj hidraj kaj termikaj elektrocentraloj estis konstruitaj kun sovetia helpo. Kaj parto de la novaj sovetiaj kreditoj estas investota en unu el niaj plej grandaj energiaj konstruobjektoj — la industria komplekso Marica-Oriento. Post kelkaj jaroj ĝiaj subĉielaj minejoj produktos jare po 25 milionoj da tunoj da karbo kaj la termika elektrocentralo, kiu nun estas konstruata tie havos kapacito de 500 mil kilovatoj kaj produktos ĉiujare po 2 miliardojn da kilovathoroj da elektroenergio.

Ni do emfazu ankaŭ, ke la helpo fare de Sovet-Unio ne elĉerpiĝas nur per disponigo de kreditoj kaj sendado de specialistoj. Ĝi havigas al ni kompletajn uzinojn, elektrocentralojn, la plej gravajn instalaĵojn, por la novkonstruataj entreprenoj, disponigas al ni

projektojn, scienc—teknikan helpon ktp.

Sed parolante pri tiu ĉi helpo, ni ne povas ne emfazi unu alian fakton, kiu ne estas malpli grava — la kondiĉoj, ĉe kiuj oni faras ĝin. La kreditoj, kiujn disponigas al ni Sovet-Unio estas je longtempa repago, kun minimuma interezo kaj oni repagas precipe per varoj, produktataj en Bulgario. En tiu situacio estas superflue eĉ menciigi pri la reciproke favora karaktero de la ekonomiaj rilatoj inter niaj du landoj.

Nek unu kapitalisma lando en pasinteco faris tian fratan kaj neprofiteman helpon al Bulgario. Tiam nia lando ne estis io pli ol nur agrara kaj krudmateriala aldonaĵo al hitlera Germanio, kiu forprenadis je malaltegaj prezoj la bulgarajn varojn.

Hodiaŭ la bulgara popolo havas eblecon fari komparon kun la pasinteco. Ĝi konscias, ke sen la helpo de Sovet-Unio ĝi ne povus atingi tion, kion ĝi havas hodiaŭ — disvolvita industrio, ĉiam pli maŝinigita vilaĝmastrumo-fundamento por plua rapida ekonomia evoluo de Bulgario.

Nova triumfo de la soveta scienco kaj tekniko

Je la 9-a de marto k. j. Sovet-Unio lanĉis kvaran kosman ŝipon-sputnikon, kiu pezas 4,700 da kg. sen la lasta grado de la raketo. Sur la „ferdeko“ de la kosma ŝipo troviĝis la hundo „Ĉernuška“ kaj aliaj vivaj kaj biologiaj organismoj. La aparataro de la kosma ŝipo funkciis normale.

La saman tagon laŭ komando fare de la soveta direktiga stacio la kvara ŝipo-sputniko sukcese alteriĝis sur difinita haveno por kosmaj ŝipoj. La hundo „Ĉernuška“ kaj la vivaj biologiaj organismoj revenis sur la teron sen difekto.

La tuta mondo rekonas Sovet-Union kiel gvidanton en la stafeto tra la kosma spaco.

PETÂR JORDANOV — REDAKTORO DE „BULGARA ESPERANTISTO“, ESPERANTA POETO KAJ AKTIVULO

Petâr Jordanov naskiĝis la 3-an de junio 1884 en urbo Târnovo — ĉefurbo de la malnova bulgara regno kaj lulilo de la esperantismo en nia patrujo. Unuagradan lernejon li studis en Târnovo, kie montriĝis liaj lernemo kaj diligento. Post kiam li finis la unuagradan lernejon li vizitis la realan gimnazion en sia naskiĝurbo ĝis la kvina klaso. En 1899—1900 li estis sendita en la ĉefurbon Sofio por daŭrigi sian studadon. Tie lia lernemo kaj kapabloj estis tre bone pritaksitaj de liaj instruistoj kaj en la fino de la jaro li ricevis certigilon pri la diligenta lernado. La naŭan klason de la gimnazio li studis en sia naskiĝurbo kaj la dekan denove en Sofio, kie en 1902 li ricevis ateston pri matureco. En 1901 li konatiĝis kun la agado de la geesperantistoj. En mallonga tempo li ellernis la lingvon kaj komencis korespondadi kun fremdaj esperantistoj per la adresaro de nia Majstro. La korespondado donis al li eblon perfektigi sian esperantan stilon kaj en 1902 ni vidas lin kiel sekretarion de la klubo esperantista „Aŭroro“ en Sofio, kies prezidanto estas N. D. Kovaĉev kaj estraranoj: H. Bâĉvarov, G. Zografski, Bradinov, T. Peev k. a., ĉiuj kun tre alta socipozicio. En tiu tempo krom lia laboro kiel oficisto kaj sekretario de la klubo, li gvidis kelkajn esperantajn kursojn, donintajn tre fervorajn adeptojn, redaktis la revuon „Rondiranto“ kaj faris multajn paroladojn propagandajn pri Esperanto. En la fino de 1905 li forlasis la ĉefurbon kaj iris en la plej grandan sanktejon de la balkanaj slavo kiel kontablisto de Rila Monaĥejo. En tiu tempo en Târnovo

eklumis radiluma esperanta centro, gvidata de Hr. Haralambev, redaktoro de la revuo „Lumo“.

Hr. Haralambev estis amiko de P. Jordanov kaj lin invitis partopreni la redaktadon de la revuo „Lumo“. Dank' al sia poeta talento kaj la belegaj kondiĉoj por meditado en la trankvileco de la granda „Rila dezerto“ P. Jordanov de 1905 ĝis 1913 verkis kaj presigis en „Lumo“ kaj aliaj gazetoj serion da versaĵoj: lirikaj versoj, baladoj k. a., kiel ekz.: „Al Veliko Târnovo“, „Soneto“, „Sen titolo“, „Balado“, „Al bulgara patrino“ k. a., ĉiuj saturitaj de freŝa sento, ŝprucanta el nobla kaj amanta koro de la poeto.

Ĉirkaŭ 1909—1910 li oficis ĉe la universitata biblioteko en Sofio; tiam li denove gvidis kursojn en la ĉefurbo kaj partoprenis aktive en la gvidado de la tiama Sofia Esperanto-societo. En 1910 li denove iris en la Rilan Monaĥejon; post 1910 li estis membro de la Centra Komitato de la tiama Bulgara Esperanto Ligo.

En 1914 P. Jordanov venis denove en la ĉefurbon kaj studis juron en la ŝtata universitato. En 1918 li estis diplomita kaj post unujara laboro kiel kandidato li en 1919 komencis labori kiel advokato en la ĉefurbo.

En tiu lasta tempo li senĉese interesiĝis pri nia movado, tradukis la versaĵojn „Paisij“ de Ivan Vazov, „Vivas, li vivas“ de Hr. Botev, en belega esperanta traduko, skribis denove kelkajn versaĵojn, kiuj montras ke lia poeta talento estas ĉiam vigla kaj lia koro sentema al homa suferado kaj malĝojo. Lia poezio estas saturita de melankolio kaj vivrezigno.

P. Jordanov prezidis du esperantajn kongresojn en Bulgario, faris frukto-donan agadon por Esperanto, partoprenis la laboron por fakultativa enkonduko de Esperanto en la lernejojn ĉe ministrado de Stojan Omarĉevski kaj tiujare estis unuanime elektita prezidanto de Bulgara Esperanto Asocio kaj post 1934 akceptis sur sin la de-

von de respondeca redaktoro de „Bulgara Esperantisto“ laŭ la postulo de la nova statuto de la gazetaro.

Li donis ĉion por Esperanto kaj la adeptoj de nia lingvo danke, simpatie kaj kun admiro sekvas lian vojon.

P. Jordanov mortis la 11-an de septembro 1952 en Sotio.

Ivan SARAFOV

ЗА КОЛЕКТИВНОТО КОРЕСПОНДИРАНЕ

Идеята на есперантското движение — за дружба между народите и траен мир—би останала мъртва догма, ако есперантистите не поддържат жива кореспондентска връзка помежду си. Особено е силно желанието на есперантистите да кореспондират със съидейници от чужбина. Всеки от нас си спомня с радост първото писмо, получено от чужбина, първия разговор с чужденец на есперанто — без помощта на преводачи. Този пряк контакт с хора от другите страни чрез есперанто е широко отворен прозорец към света. Всеки ден стотици писма, написани от български есперантисти, заминават за чужбина, стотици писма се получават от чужбина. Съдържанията на писмата са различни в зависимост от културата, професията или обществената деятелност на кореспондиращите есперантисти. Над всички интереси стои любовта на българските есперантисти към нашата прекрасна социалистическа Родина.

Освен лична кореспонденция българските есперантисти водят и организирано широко колективно кореспондиране между предприятия и други колективи с предприятия, колхози, училища и други подобни в чужбина.

Писмата, които ние изпращаме в чужбина, се четат с особен интерес. Ние лишем за възхода на нашата родина, за новите заводи, за новите

градове и села, за нашия нов живот.

Шестнадесет години героичният български народ под ръководството на БКП извърши велики дела. Страната се индустриализира, широките кооперативни поля се обработват с машини. Непрекъснато се повишава материалното и културно положение на трудящите се. Възникна ново социалистическо отношение към труда, към социалистическата собственост, на хората помежду им. В предприятията кипи благородно социалистическо съревнование, изграждат се все по-вече и по-вече бригадири за ударен социалистически труд. Работническите колективи изпълняват и преизпълняват годишните си планове, преизпълняват петилетния план предсрочно.

Есперантистът патриот, където и да погледне, ще намери богат извор на теми за своите писма до чужбина. Работническите колективи с чувство на радост биха разказали на другарите си в чужбина за своите успехи. Те биха споделили своя опит с работниците от социалистическите страни. Задачата на есперантистите е да свържат работническите колективи със заводи и предприятия в чужбина.

Есперантските дружества трябва широко да използват съвместните окръжни на Българските професионални съюзи, на Димитровския комунистически младежки съюз и на Бъл-

гарския есперантски съюз за откриване на курсове в предприятията и учрежденията, младежките колективи—дружества, физкултурни колективи, училища, висши учебни заведения и пр.

Във всяко предприятие, учреждение, и пр. ние трябва да открием есперантски курс. От курсистите трябва да изградим есперантски кореспондентски кръжок, който да се свърже със сродни предприятия в чужбина. В писмата работниците сами да разказват за своите трудови успехи, за своя личен, обществен и културен живот. Младежите да разказват за успехите си по пътя на овладяване науката и техниката, за политехническото образование у нас, за своите физкултурни успехи и пр. Всеки колектив може да разкаже за огромната борба за мир, която води нашият народ, за мирната политика на нашето народно правителство. За да се организира добре колективното кореспондиране, всяко есперантско дружество трябва да има отговорник за кореспондентската работа. Отговорникът трябва да бъде определен измежду най-добрите есперантисти. Той от своя страна да се свърже с курсовете в предприятията, колективите и там на място да изгради есперантски кореспондентски кръжок или да се излъчи кореспондент-есперантист. Там, където няма есперантисти, отговорникът да се свърже с профкомитета, ръководството на младежкото дружество или редакцията на многотиражката, ако има такава, и да поиска да определят кореспондент, който да пише писмата. Написаното писмо на български, подписано от работници, да се предаде на отговорника-есперантист, който ще има грижата да бъде преведено на

есперанто. Написаното на български писмо, съответно подписано заедно с превода му на есперанто да се изпрати в чужбина на сродно предприятие с молба да се прочете пред работниците и се даде за публикуване в тамошната преса.

Получените писма от чужбина трябва да се прочат пред работниците да се публикуват в многотиражката или в друг местен вестник. Най-интересните писма да се изпращат преведени заедно с оригинала за публикуване в нашата централна преса. Дружествата по места да помислят как биха могли да приведат в известност броя на есперантистите кореспондиращи с чужбина, с кои страни и на какви теми. Чрез една такава анкета ще можем да видим огромната пропагандна работа, която вършим ние есперантистите, малкият комитет за културни връзки със чужбина — както нарече БЕС нашият любим писател Г. Караславов.

Есперантското движение у нас расте и се развива с всеотдайната помощ на БКП и нашето Народно Правителство. Това ни задължава да работим още по-активно за разпространението на есперанто и чрез него да печелим приятели за нашата страна, да разгаряме борбата за пълно разоръжаване, за мир и дружба между народите.

Писмата за чужбина трябва да бъдат идейно издържани и в тях ние трябва да пишем само истината.

С помощта на прогресивните есперантисти от целия свят да изградим гъста кореспондентска мрежа с всички страни, да печелим приятели, да засилваме дружбата си с всички народи, да се борим за запазването на мира.

Траяна ПЕТКОВА

PLUK-MINIATUROJ DE THORSEN

Eld. Dana Laborista Esperanto
Asocio — Arhus, 1960.

Bukedo de malgrandaj versaĵoj, elegante verkitaj, ili fakte estas poeziaj eseoj, el kiuj ŝprucas bonhumoro kaj ironio, saĝaco kaj surkasko.

Verkitaj majstre kaj lerte, ili enhavas kritikon al la burĝa socio kun ĝiaj kontraŭdiroj kaj neforigeblaj difektoj, ekz. en „Internacia juro“ — la aŭtoro primokas la moralon de la burĝaj politikistoj; en „Maksimo“ — li atakas la kalumniojn de la burĝa gazetaro; en „Afriko“ li kondamnas la kolonian jugon, en „Du sloganoj“ li strebas por paco, kontraŭ la atommilito.

Multaj versaĵoj pritraktas la falsan kaj jezuitan burĝan moralon. ekz. „Tusobuŝo“. „High society“, „Signo pri kaduko“; per aliaj P. Thorsen ironias la burĝan filozofion („Ekzistencialismo“).

En plej sintezita formo la aŭtoro elstaras antaŭ ni kiel homo, kiu plej proksime travivas kaj sentas la socipolitikajn problemojn. Li meritas gratulon pro la majstra maniero laŭ kiu li pritraktas la tuŝitajn problemojn.

Samtempe ni ne povas ne noti, ke iuj eseoj estas verkitaj en pesimisma tono, aliaj — en ne tre pentrarta, cinisma aspekto. Ekzemple: „Lukto sen produkto“, „Amara konkludo“ kaj feliĉe, ili ne estas multaj.

La stilo estas bela, eleganta; la versaĵojn oni legas kun plezuro.

Per sia nova poemareto Poul Thorsen, kiu estas progresema kaj kultura nia samideano denove faris paŝon antaŭen en sia firmiĝo kiel talenta poeto kaj socia aganto.

Ni bondeziras al samideano Thorsen novajn sukcesojn en lia kreado, kontribuo en la trezorejo de la esperanta literaturo.

Vasil ĈOĈOV

LISTO DE LA REDAKTOROJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

- I (1919—20) — Sim. Petkov, G. Atanasov, P. Kolev, R. Bojaĝiev, G. Gaŝevski, St. Minkov.
- II (1920—21) — Ada, P. Kolev, G. Atanasov
- III (1921—22) — Ada, P. Kolev, Iv. Dobrev
- IV (1922—23) — Ada, P. Kolev
- V (1923—24) — Ada, P. Kolev, D. Simeonov
- VI (1924—25) — Z. Zaĥariev, As. Grigorov, Ada
- VII (1925—26) — As. Grigorov, Z. Zaĥariev
- VIII (1926—27) — Z. Zaĥariev k. a.
- IX (1927—28) — Z. Zaĥariev
- X (1928—29) — Iv. Kotov
- XI (1929—30) — St. Radev k. a.
- XII (1930—31) — Z. Zaĥariev
- XIII (1931—32) — Sim. Hesapĉiev
- XIV (1932—33) — Sim. Hesapĉiev
- XV (1933—34) — St. Radev, St. Minkov, P. Mitkov
- XVI (1934—35) — Iv. Ĥ. Krăstănov, Iv. Dobrev, P. Jordanov
- XVII (1935—36) — Z. Zaĥariev, Iv. Dobrev, B. Oktomvrijski
- XVIII (1936—37) — As. Grigorov, Em. Stratev
- XIX (1937—38) — P. Jordanov
- XX (1938—39) — P. Jordanov
- XXI (1939—40) — P. Jordanov
- XXII (1941) — P. Jordanov, prof. St. Ĉuĝev,
- XXIII (1942) — prof. St. Ĉuĝev,
- XXIV (1946) — Iv. Sarafov k. a.
- XXV (1947) — Iv. Sarafov k. a.
- XXVI (1957) — V. Oljanov, Ada, As. Grigorov, K. Draĵev, Sim. M. Simeonov
- XXVII (1958) — V. Oljanov, Iv. Sarafov, St. Ĥristova, St. Kiraĝiev, St. Masărov
- XXVIII (1959) — V. Oljanov, Iv. Sarafov, St. Ĥristova, St. Kiraĝiev, St. Masărov, Sim. Simeonov
- XXIX (1960) — V. Oljanov, Iv. Sarafov, St. Ĥristova, St. Kiraĝiev, St. Masărov, Sim. Simeonov
-
- XXX (1961) — C. Murgin, At. Lakov, Iv. Sarafov, K. Draĵev, V. Oljanov, S. Simeonov.

En ĵurnalo „Oteĉestven Glas“ — Plovdiv (28. VI. 1959) — artikolo pri la traduko de la romano „Bofilino“ de Georgi Karaslavov en Esperanto. En la sama ĵurnalo 27. X. 1959) — informo pri malfermo de Esperanto-kurso en la ŝtata presejo „D. Blagoev“ en Plovdiv. En la sama ĵurnalo (6. XII. 1959) — informo pri la solena celebrado de la 101-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof kun ilustraĵo. Docento d-ro P. Pejĉev transdonas al la prezidanto de la Esperantista Societo k-do Iv. Bataklijev albumon, silkan ruĝan standardon — donaco de la leningradaj esperantistoj. En la sama ĵurnalo (3. II. 1961) — artikolo de Iv. Bataklijev — „Per la internacia lingvo al la junulara balo kaj konferenco en Plovdiv.“ En la sama ĵurnalo (4. II. 1961) — artikolo de Iv. Ŝivarov — „Ĝardeno de la paco“ — pri la kreo de nova ĝardeno en urbo Debrecen, Hungario, okaze de la 600-jara jubileo de la urbo en 1961.

En la bulgarlingva revuo „Bulgara—Soveta Amikeco“ n-ro 21 (novembro 1960) aperis artikolo de Ivan Sestrimski „Libroj en bulgara lingvo en la persona biblioteko de L. N. Tolstoj“ La aŭtoro skribas, ke la biografioj de Tolstoj diras, ke li legis en originalo literaturojn en la jenaj lingvoj: angla, germana, franca, itala, ukraina, pola, ĉeĥa, bulgara, serba, nederlanda, tatara, malnovgreka, latina, malnovhebrea kaj Esperanto.

En la bulgarlingva periodaĵo „Pollando Hodiaŭ“ n-ro 9 (decembro 1960) aperis artikolo de Iv. H. Krestanov — Miaj renkontoj kun D-ro Zamenhof — la kreinto de Esperanto.

En ĵurnalo „Oteĉestven Glas“ — Plovdiv (28. I. 1961) aperis informo „Oni honoras la memoron de D-ro Zamenhof“ — pri la solena kunveno, dediĉita al D-ro Zamenhof, organizita en Moskvo de la Esperanta Sekcio ĉe la Domo de la Medicinaj Laboristoj. En la domo estis organizita ankaŭ esperanta ekspozicio.

En la sama ĵurnalo de 7. II. 1961 aperis informo pri la junulara balo, okazinta la 4-an de februaro kaj pri la konferenco de la junuloj-esperantistoj en Plovdiv, okazinta la 5-an de februaro.

En ĵurnalo „Septemvriĉe“ (8. II. 1961) aperis informo de Tanja Manolova, prezidantino de taĉmento n-ro 9 en vil. Polski Trâmbeŝ, distr. de Târnovo, ke ili decidis lerni la internacian lingvon Esperanto. Ili kontaktiĝos kun infanoj el la tuta mondo.

En ĵurnalo Dimitrovgradska Pravda“ — Dimitrovgrad (9. II. 1961) — informo „Vigla esperantista societo“ de E. Jovov pri la agado de la societo „Internacia Amikeco“.

„Miĉurinskaja Pravda“, n-ro 37 la 25. 2. 1960 informas, ke la fama soveta poeto Mihail Isakovskij skribis al gestudentoj de frukto-kultura instituto je nomo de Miĉurin... „Estas vero, ke en junaĝo mi sciis la lingvon Esperanto. Estas ankaŭ vero, ke mi provis en tiu lingvo verkigi poemojn, sed mi verkis nur unu aŭ du — ne pli. Mi memoras ankoraŭ, ke mi tradikis el Esperanto en la rusan lingvon la poemon „La naŭa valo“ (aŭtoro Schrind). Ĝi estis publikigita en provinca gazeto somere 1917. Mi memoras plu, ke mi povis traduki (kaj se mi ne eraras, mi tradukis komplete) ea Esperanton la rusan popolan kanton „Ne lo vento branĉeton fleksas“. Mi faris ĝin laŭ peto de unu itala komponisto...“ Lernu Esperanton kaj okupu vin per ĝi en plena vasteco Kiel helpa lingvo Esperanto estas tre bona lingvo kaj ĝia utilo estas sendube tre granda...“.

Eleus Leonardo de Sâ, MEM-peranto de Brazilo, inter alie skribas en la 2-a numero de „Paco“, 1961: „Al ni, malriĉuloj en Brazilo, estas malpermesate skribi al eksterlando, kvankam ni mem el tie povas ricevi poŝtaĵojn. Fakte estas, ke nia registaro tre altigis la tarifon por eksrerienda sendado.“


Letero, kiu antaŭe kostis Cr. 11.50 (egala al 6 resp.-kup.) kostas nun Cr. 48 (egala al preskaŭ 25 resp.-kup.)! Do malriĉuloj ne povas pro la alta tarifo sendi leterojn eksterlanden. Bedaŭrinde la riĉuloj ne havas idealojn. Ili havas nur tri celojn: MONO, MONO kaj MONO.

Mi petas pardonon, se mi ne tuj povus respondi al miaj korespondantoj, sed mi esperas, ke mi povos servi ilin laŭpove kaj sen longa prokrasto“.

La ĵurnalo „Transportna Iskra“ — Sofia (8. II. 1961) s-ano D. Popov sekretario de la esperantista societo „Printempo“ priskribas la belegan ekskurnos de kvar esperantistoj al Hungario.

La ĵurnalo „Orjahovska Tribuna“ — Orjahovo. (20. II. 1961) informas pri la malfermo de du kursoj en la urbo — elementa kaj supera.

RONDO EN KONGO



La koloniistoj forlasas Kongon

Ĉirpan. La 21-an de januaro k. j. la Esperanto—Societo en nia urbo okazigis sian jarkunvenon. Gaste al la kunveno ĉeestis k-do A. Ĥristov — dua sekretario de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio (BKP) Iv. Pašov el fako „Popola Klerigo“ de la Urba Konsilantaro kaj D. Dobrev de la CK de BEA. La kunveno estis anticipe, bone preparita laŭ la rekomendoj de cirkulero n-ro 3 de BEA.

Pri la ĝisnuna agado raportis k-do D. Jankov. La ĉeestantoj kritike analizis laboron kaj faris valorajn rekomendojn. Evidentiĝis ke la agado ne estas kontentiga kaj en la estonteco estas necesaj urgaj rimedoj por plivigli la movadon en la naskiĝurbo de bulgara poeto P. K. Javorov. Favoraj kondiĉoj ne mankas. La lokaj aŭtoritatoj ĉiam pretas helpi societon.

Ivan Peev

Dimitrovgrag. La Esperanto—Societo „Internacia Amikeco“ organizis sian jarkunvenon la 15-an de januaro k. j.

En la raporto de la prezidanto estis substrekitaj kelkaj gravaj iniciatoj realigitaj dum la pasinta jaro. Nome oni organizis kursojn kaj propagandan vitrinon, oni partoprenis aktive en la unuamaja popola manifestacio kun tre granda efiko. La anoj de la societo amase vizitis la 34-an kongreson en Târnovo kaj al la 45-a Universala kongreso veturis kvin kongresanoj.

Fine k-do Oljanov salutis la kunvenon en la nomo de CK de BEA pri la atingitaj sukcesoj kaj substrekis ke la societo prosperas kaj rikoltas sukcesojn dank' al la laboremaj kaj viglaj dimitrovgradaj esperantistoj.

Gančo Ganĉev

Jambol. La Esperantista Societo „Maksim Gorkij“ okazigis sian jarkunvenon je la 3-a de februaro k. j. En la speciale ornamita societa klubejo alvenis ne nur la membroj sed ankaŭ multaj gastoj.

Post la raporto de la prezidanto Al. Blagoev la ĉeestantoj starigis multaj demandoj. K-do V. Oljanov — reprezentanto de CK de BEA kaj Al. Blagoev respondis al la demandoj kaj informis la kunvenon pri la planitaj iniciatoj de BEA kaj donis proponojn por plibonigo de la estonta agado.

La kunveno akceptis enhavoplenan rezolucion kaj elektis novan estraron en kiun apud la malnovaj esperantistoj eniris novaj junaj aktivuloj.

Al. Blagoev

Velingrad. La jarkunvenon de la Esperanto—Societo „Stojo Kalpazanov“ okazinta la 29-an de januaro k. j. ĉeestis 24 membroj. Ĉi-tiu estas la unua grava organiza kunveno de la juna societo. La kunvenon partoprenis ankaŭ

reprezentanto de la Urba Komitato de BKP — Iv. Ĥarizanov kaj du gastoj el Pazarĝik — la k-doj Arnaudov kaj Sotirov.

La ĉeestantoj pridiskutis la agadon de la societo kaj montris efikajn rimedojn por estonta plibonigo de la esperantista propagando en Velingrad.

Manol Ĉolev

Kazanlâk. La 15-an de januaro k. j. okazis la jarkunveno de E-Societo „Roza Valo“. La pasinta jaro estis tre sukcesoplena por nia societo. Oni disvolvis konsiderindan organiza kulturklerigan kaj propagandan laboron dank' al realaj kaj ritme plenumataj monataj planoj kaj larĝa reto de aktivuloj.

La societo atingis la enviindan nombron de 204 gesocietanoj kaj 66 abonantoj. Estis organizitaj kelkaj solenaj kunvenoj je diversaj okazoj: Zamenhofa naskiĝa datreveno, Internacia Tago de la Virinoj, Granda Oktobra Revolucio ktp. El la programo de la societaj iniciatoj ne mankis ankaŭ interesa letervespero, kelkaj ekskursoj, laborbrigado kaj instalado de marmora tabulo sur la montpinto „Botev“ por la heroe pereinta en la batalo kontraŭ la faŝismo s-no N. Nedelĉev. Helpe al la internacia korespondado de niaj membroj dufoje ni organizis prelegojn je temo: „Kiel kaj kion ni devas skribi al niaj eksterlandaj gesamideanoj.“

Niajn sukcesojn ni ŝuldas ankaŭ al la helpo de la Urba Komitato de BKP kaj al la Urba Konsilantaro.

Dum la nova jaro ni penos ankoraŭ plifirmigi kaj plivarilgi nian agadon. Ni plimultigos la abonantojn por „Bulgara Esperantisto“, plibonigos la internacian korespondadon kaj pliriĉigos nian Esperanto-bibliotekon. Apartan atenton ni dediĉos al la lingva perfektigo.

Andrej Panĉev

Sofio. La jarkunveno de la Sofia Societo „Maksim Gorkij“ okazis je la 30-a de januaro 1961. La raporto de la societa prezidanto — k-do C. Murgin montris evidentan progreson kompare la pasintan jaron. La nombro de la membroj atingis 600 anojn, inter kiuj tamen nur 450 pagis sian kotizon. Kvarono de la membroj estas abonantoj de „Bulgara Esperantisto“. Dum la jaro estis organizitaj 19 kursoj en kiuj lernis Esperanton 400 gecivitanoj. Pro la malvigla agado de la societa estraro nur la duono el ili fariĝis membroj de la societo.

La sofiaj esperantistoj kun la helpo de la Ĉefurba konsilantaro konstruis monto-domon „Esperanto“ en Vitoŝa apud Sofio. En la konstruado de la monto-domo la societo „Maksim Gorkij“ kontribuis per 6.000 levoj kaj 500 labortagoj.

Oni kritikis la estraron ke ĝi ne havis informon pri la internacia korespondado de siaj membroj.

St. Kadiev

PORESPERANTA ALVOKO EN LA PACMOVADO

La aŭstra packonsilantaro delegis nian amikon D-ro Adolf Halbeld al konferenco de la ĉeĥoslovaka, germana kaj aŭstra packonsilantaroj, kiu okazis en Prago. La ĉ. 200 gedelegitoj interkonsilis en tri grupoj (misuzo de la atomforto, senarmigo, kunekzistado). Kiel reprezentanto de MEM, nia amiko prenis la okazon por atentigi pri la neceso de vera kompreniĝo en kaj inter la vasta publiko de ĉiuj landoj. Li pledis por Esperanto rekomendante, ke oni ĝin lernu kaj ĉiam pli amplekse uzadu por la celo de la tuthomara paco.

HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

Jus estis fondita HEA,—Hungara Esperanto—Asocio, kies celo estas krei kaj flegi amikajn rilatojn kun ĉiuj Esperanto-organizoj de la mondo por realigi la pacan kunlaboron kulture, ekonomian kaj turisman inter la popolojn per la internacia lingvo, por realigi la noblaon celadojn de UNESCO kaj de la Mondpaca Konsilantaro pri amikeco, rektaj interrilatoj kaj daŭra paco inter la nacioj, por reciproke pli bone koni, esti kaj ami unu la alian, por progresigi la literaturon de Esperanto kaj konigi sian landon, kiu obstine konstruas socialismon kaj celas la veran pacon.

DANGERA VIRINO EN OKCIDENTA GERMANIO

La greka satiristo Aristofanes verkis antaŭ 2000 jaroj „Lysistrate“, tragikomedion pri la virinoj de Ateno kaj Sparta, kiuj faris amstrikon por haltigi la militon.

Ĉi-vintre oni prezentis ĝin en Okcidenta Germanio kiel TV-filmon, sed la registaro malpermesis ĝin. Kial? Tial ke la TV-filmo havas klaran kontraŭmilitan tendencon kaj estas apelacio por la paco.

La cenzuro de Adenauer atakas nun ankaŭ antikvan verkon. Li tiras malsupren la ĉapon antaŭ la okuloj de la germana Miĥaelo, por ke li ne estu delogita de la bela Lysistrate.

ESPERANTO EN GDR

Nia kamarado L. Schödl skribas: „Mi ricevis signojn de grupa vivo el Gotha, Plauen, Görlitz, Auerbach kaj raportetojn pri individuaj klopodoj de multaj k-doĵ, i. a. de k-do Ernst Dietrich de Warin, kiu en tiu ĉi jaro ricevis la tre altan ŝtatan ordenon „meritinta instruisto de la popolo“. Post 28 jaroj de nevido subite vizitis min k-do Rudi Geraetz, tiam energi plena gvidanto de Laborista Esperanto—Ligo, distrikto Mecklenburg, hodiaŭ estro de

nia ŝtata komerca delegacio en Danlando. Pasis 28 jaroj, sed li ŝajnis al mi same verva kaj entuziasma por Esperanto kiel antaŭ 28 jaroj ĉe la fondkongreso de Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE).

En Neŭruppin mi restis preskau sola, kiel kokino, kiu elkovis anasojn, kiuj sin ĵetas en la akvon. Miaj iamaj gelernantoj fariĝis nun studentoj kaj metilernantoj en aliaj urboj. Kion fari? Mi varbis novajn adeptojn — tute junajn, por longe havi ilin! — 11—13-jaraj. Depost oktobro ili lernas Esperanton kaj jam fariĝis lernema, sed ankaŭ petolema kolektivo, entute 26 etuloj. La resto de 4—5 „maljunuloj“ ĉiam zorgas pri ekspozicioj en la pionirdomo kaj en du supraj lernejoj. Nia devizo estas: „Persiste antaŭen! Ni zorgu, ke Esperanto servu al la paco!“

DEZIRAS KORESPONDI

JUGOSLAVIO

Kvar geïnstruistoj el Bajmok: 1) Ruĵa Marković (f-ino, 30-jara), Trg Maršala Tito 9 — pri geografio, ekonomio, vivmaniero, PI; 2) Valerija Višer (f-ino, 23-jara), Strosmajerova 40 — kun ĉi pri ĉi; interŝ. modgaz.; 3) Ferencz Saraĉ (fraŭlo, 28-jaraĝa), Strosmajerova 40 — kun foraj orientaj landoj, interŝ. PI kaj fotojn; 4) Antal Mojzef (fraŭlo, 26-jara), Mala ul. 17 — kun belaj f-inoj el ĉi pri interresaj temoj; interŝ. fotojn

Milka Maravić (lernantino, 15-jara), Vojislav Mišica 1 — kun ĉi pri muziko, filmo, PI.

Natalija Jovanović (dommastrino, 33-jara), Preradovića 2 — kun ĉi pri familia vivo; interŝ. modgaz., familiajn fotojn.

Alija Torić (lernanto, 18-jara), 16 Misljanske 37, Odzak (Bosna) — pri muziko, filatelio kaj foto.

NEDERLANDO

Klaas Limbuog el Utrecht sciigas, ke lia nova adreso estas: Mallestrato 11. Utrecht.

POLLANDO

Eduardo Weremko (studento, 19-jara), Lo-piennik Gorny (pow. Krasnyslaw, Lubelskie-woj) — pri pentroarto, filatelio; PI, PM el Bulgario, Hungario, Rumanio kaj USSR.

Lucja Grandys, Krakovo, Florjanska 51/4—36-jaraĝa oficisto, nova esperantisto.

RUMANIO

Virgil Enache (advokato), str. Fraterina Teodoru 49, Craiova — kun ĉi pri arto, litera-

uro, kulturo, scienco k. a.; interŝ. librojn, gaz., insignojn k. c.

Julju Bor (studento, 23-jara), str. Marinescu 2, Cleuĵ-kun ĉi pri kino, literaturo, arto, fremdaj lingvoj; interŝ. Pl, PM, librojn en diversaj lingvoj, kantlibrojn k. a.

Nicolae F. Mateescu, str. Griŝan 6, Caransebeŝ — dez. ricevi abonojn de gazetoj, librojn kaj aliajn E-ajojn kontraŭ rumanaj PM

Dedi Aurel (oficisto). Insp. Adas-Cricov, str. 1 Mai 131 Urlati (rajon Cricov, reg. Ploeŝti)—kun gejunuloj el Bulgario

USSR

Geesperantistoj (15-18 jaraĝaj) deziras korespondi kun tuta mondo. Interŝ. PK, IK, fotojn PM, revuojn, librojn. Adreso: Estonio, Suure-Jaani Nurme 5, Vello Pau.

Teodor Pent (teknikisto, 31-jara), Vabaduse 10-2, Kivioli, Estonio dez. kor. kun ĉi, pri ĉi. Interŝ. PM.

VIETNAMIO

MR. Tràn-quang-Thiep, Hthu: 5.441, Thanhhoa — kun gejunuloj. Interŝ. BK, fotojn, ilustritajn revuojn, PM

USA

Negro Usona Esperanta Societo, 5006 Drexe Boulevard, Chicago 15, Illinois dez. kor. kun gesamideanoj tutmonde, kiuj havas de 19 ĝis 40 jarojn pri muziko, ĝaza kaj klasika kaj popola muziko, literaturo, folkloro, edukiteco, fiziologio kaj aliaj temoj. Interŝ. PK, IK, librojn, gazetojn, revuojn, paĝnotilojn.

INDONEZIO

Lie Djing Hwee, Kongsj Lama 110 Jogjaharta-Djawa.

Pik Hong Die, Surjatmadjan 3, Jogja Kweék Tjung Rien, D/A Kongsj Lama Jogja Jauĵ Bing Tjwan, Kantil Redjo 142, Jogja Ĉiu deziras korespondi kun geesperantistoj el tutmondo je ĉi

BULGARIO

Dobri Hr. Gorov, vil. Barakovo, distr. de Kjustendil — laboristo, fraŭlo en esperanta, franca, germana, itala lingvoj kun ĉi.

Inĝ. Hristo Stefanov, str. D-ro Beŝev 84, Pleven — kun ĉi. Interŝ. PM, PK. Respondoj tuj.

F-ino Dragomira Stefanova (17 jaraĝa), str. Ivan Dimitrov 26 vĥod „G“ Ruse — kun ĉi en germana, rusa kaj bulgara lingvoj.

40 jaran jubileon festos baldaŭ Esperanto-societo „Sukceso“ en Vraca. Skribu amase propagandcele je temo — „Kion mi scias pri Bulgario kaj per kiu fonto?“ La skribintoj ricevos respondon. La adreso sufiĉas.

Ĉirkaŭ 50 gekursanoj malpacience atendas sian letervesperon, kiu okazos fine de marto. Ili petas la gesamideanojn en la tuta mondo skribi al Stefan Popov (kursgvidanto), str. Slivnica 14, Ruse

Ljubomir Leviĉarov, str. Jordan Nenov 11-a, Pazarĝik, deziras kontakton kun gesamideanoj filatelistoj; celo — interŝanĝo PM kaj pritrakto de filatelaj demandoj.

BRAZILIO

Oscar Hoff, Rua Ferreira Pentrado 276, Campinas

REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,
Kiril DRAĴEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Formato 71×100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bul. Dondukov 57, Sofia, Tel. 7-46-01, Ĉek-konto 15/1052

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofia

La plej konvena donaco
por via eksterlanda korespondanto estas

ELEKTITAJ VERSAĴOJ

de NIKOLA VAPCAROV

kun antaŭparolo de ĤRISTO RADEVSKI
sub la redakto de ATANAS LAKOV

Luksa papero, broŝurita, paĝoj 72

Aĉetebla ĉe la librejoj de la Bulg. Esp. Kooperativo
en Sofio kaj ĉe la librejoj de „Peĉatni proizvedenija“ en la
pli grandaj urboj de 1 lando

Prezo 6.70 lv.

KANTOJ POR LA PACO

DE CANKO MURGIN

kvara kompletigita eldono. Mendebla ĉe la eldonanto:
Sveda MEM-Sekcio, k-do Karl Kvist, Box 109-a, DEJE, Svedio
kaj en Bulgario ĉe la Bulgara Esperantista Kooperativo.

Prezo: 1.60 sv. kr.: 4 int. resp-kuponoj

aŭ 2 levoj.

